

Ho mia kor' laŭ Handzlik. Leterkesto.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1990 oktobro 11.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo90-21/SRI-1990-21-B-6-Claude-kaj-Andree-Gacond-Ho-mia-kor-lau-Handzlik-kaj-Leterkesto.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Hodiaŭ ni unue aŭdigos al vi alian kanton el la kasedo 'Sur placo de ĉiela pac' de Georgo Handzlik, antaŭ daŭrigi la respondadon al ĉiuj, kiuj replenigis nian leterkeston. Ĉiuj konas la poemon der Ludoviko Zamenhof 'Ho mia kor'. En sia kasedo, 'Sur placo de ĉiela pac' la kanzonisto Georgo Handzlik tiel kantas tiun poemon:

(muziko)

Cl.- Nia leterkesto repleniĝis. Tio donas al ni la okazon esprimi nian amikecon al tiuj, kiuj sendis aŭdraporton, salutvorton, demandon, proponon aŭ kritikon. Hodiaŭ ni esprimos unue nian dankemon al tiuj, kiuj sendis poŝtkarton kun esperanto-teksto. Tiujn dokumentojn - kiel ni diris jam la pasintan semajnon - ni transsendos al la arkivejo Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds por ties riĉigo.

A.- S-ro LEMAIRE en Lyon, Francio, salutis per malnova bildkarto pri la malnova haveno de Marsejlo.

Cl.- Denise kaj André LOISEL en Saint-Raphael, Francio, havigis al ni poŝtkarton kun vaportrajno kaj aviadilo kaj la diro: Esperanto je servo de centjara progreso.

A.- Leopold PATEK en Klosterneuburg, Aŭstrio, sendis poŝtkarton stampitan okaze de la 42a IFEF-Kongreso en Hamar, Norvegio kaj gluis sur alian poŝtkarton artikolon, kiun li verkis por la gazeto "Die Kleine Klosterneuburger Tullner Zeitung". Ĝi raportas pri la korespondaĵoj, kiujn ricevas Svisa Radio Internacia. Ni profitas menci, ke en la arkivejo CDELI konserviĝas ĉiuj esperanto-artikoloj pri esperanto. Ni petas ĉiujn, kiuj sendas artikol-eltranĉaĵojn por la riĉigo de tiu arkivaro, ne forgesi ĉiam indiki la nomon de la gazeto, la urbon kaj la aperdaton.

Cl.- Fritz WALTER POPPECK en Oberkirch, Germanio okcidenta, havigis al ni poŝtkarton pri la Naturamikaj Esperantistoj kun la titolo '1001 noktoj kun la Naturamiko en 1001 domoj en Eŭropo'. Ĝi informas pri la nombro de la naturamikaj domoj en la diversaj landoj. Aŭstrio havas 186 domojn, Belgio 16, Britio 2, Danlando anknur nur 2, Finnlando 6, Francio 81, Germanio okcidenta Hispanio 1, Hungario 3, Italio 4, Nederlando 20, Svislando 101.

A.- Vilmos SÁGI en Székesfehérvár, Hungario, sendis poŝtkarton kun la teksto "saluton el Hungario".

Cl.- Skolta Esperantista Ligo dankis nin per karto pri Julja kaj Romeo en Verona kun la esperanto-indiko: "La rememoro de la kortuŝa historio, ĉiam vivos en Verono kaj en la tuta mondo, por kanti la belecon, la grandecon, la eternecon de vera amo."

A.- 11 membroj de Trenta Esperanto-Asocio. Italio, okaze de la Semajno de Internacia Amikeco, sendis poŝtkarton kun monumento de Dante.

Cl.- Guiseppe VALENTE, en Udine, Italio, salutis nin per poŝtkarto de "Amikeco trans limoj".

A.- Bildon de Esperanto-Muzeo en Utrecht kaj karton el la serio "Bela Nederlando" sendis Mila VAN DER HORST KOLINSKA en Den Haag. Verda stelo kun portreto de Zamenhof staras meze de parka arbaro.

Cl.- Ludvik VESELY en Praha, Ĉeĥoslovakio, salutis per poŝtkarto titolita "Saluto el Praha". Ĝin subskribis 16 partoprenintoj al esperanto-kurso por komencantoj, kiu finiĝis fine de majo.

Kaj nun ni salutas al ĉiuj aliaj skribintoj laŭ la alfabeto ordo de iliaj nomoj:

Ernest BATEY en Newbridge Hill, Britio, skribis:

A.- Antaŭ ĉio mi certigu al vi, ke mi regule aŭskultas viajn elsendojn en Esperanto, kaj tiujn direktitajn al Azio kaj tiujn al Eŭropo. La ricev-kvalito estas preskaŭ ĉiam bona, kaj mi esperas, ke ebligas al vi longe daŭrigi ilin.

Cl.- Saluton al Christoph BAYER en Waiblingen, Germanio okcidenta,

al Ulf BELING en Finsterwalde, Germanio orienta,

al Maria BELPOŠEVIĆ en Zagreb, Jugoslavio kaj

al Vladimir BESPALOV en Soĉi, Sovetio, kiu skribis tre interesan dupaĝan leteron pri sia aŭskultado de niaj elsendoj kaj en alia plurpaĝa dokumento li interese raportas pri arbo de amikeco. El tiuj novaĵoj indas citi kelkajn erojn:

A.- Grandan dankon pro la alsendo de via nova bela prospekto de Svisa Radio Internacia. Dank' al ĝi mi nun havas bonegan akcepton de viaj programoj. Mi jam elprovis multajn frekvencojn kaj kun ĝojo povas raporti, ke fakte en Soĉi estas plej bone akcepteblaj viaj dissendoj en plej kurtaj ondoj... Mi jam sukcese aŭdis ĉiujn viajn programojn ekde la 10-a horo 45 - 10-a 55 ĝis la lasta je la 22-a 15 - 22-a 25, kvankam tiu programo en nia loka somera tempo (diferenco 4 horojn) pasas jam en profunda nokto: -2a horo 15 - 2-a horo 25, kaj nun mi skribas al vi la leteron ĵus aŭskultinte tiun ĉi noktan programon preskaŭ je la tria horo nokte... Estas ege interesaj viaj programoj pri informoj de aŭskultantoj... Domaĝe, ke ne ĉiujn mi sukcesis aŭdi. Sed ankaŭ viaj aliaj programoj ege plaĉas al mi ne nur pri Esperanto-temoj, sed pri Svislando. Mi ilin surbendigas kaj regule prezentas en nia Esperanto-klubo "Laro" kaj tio ege pliriĉigas niajn klub-kunvenojn. Tre ofte mi tajpas la tekston kaj tiam ni kune legas ĝin, samtempe aŭskultante vian prononcon, kiu tamen sufiĉe multe diferencas de la nia kaj tiamaniere aŭskultantoj (komencantoj) al kutimiĝas al prononco de alilandanoj.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon Claude kaj Andrée GACOND daŭrigos la respondadon al skribintaj geaŭdantoj. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*